

KATALUNA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO


numero 265 (32) - kvina epoko - decembro 1989

FELIĈAN 1990

deziras tutkore al la legantoj de nia revuo, la Plenumkomitato de KEA.




Jen la frontpaĝo de la poemaro "Tombejo de Sinera" kiun nia Asocio ĵus eldonis (informo sur paĝo 2a)



SOMERO 1989

LA SUPLEMENTO DE KATALUNA
ESPERANTISTO

2



CEMENTIRI DE SINERA de Salvador Espriu
TOMBEJO DE SINERA Traduko de Gabriel Mora i Arana

legu ankoraŭ pri niaj 29aj Internaciaj Floraj Ludoj sur paĝoj 3a kaj 4a.

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO/ KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
(Enregistrata de la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio per n-ro 5785)
Apartat /Poŝtkesto, 290 - 08200 Sabadell- Catalunya/Katalunio. Telefonnumero (93)
716.3633(ekde lundo ĝis vendredo inter 20a kaj 22a h.) Kolektiva membro de Koo-
perativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la
Sciencoj San Marino

KOTIZOJ POR LA JARO 1989: Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua
Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 3200 p-toj; Kolektiva
Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - Agència 461 - Sabadell kontonumero 550 - 53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: **Prezidanto:** Jordi Carbonell i Pinyol; **Vicprezidanto:**
Maria Garcés i Coll; **Ĝenerala Sekretario:** Llibert Puig i Gandia; **Kasisto:** Òscar Puig
i Cánovas; **Komitatoj:** Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Joan R.
Guiñón; Ĝirona Espero, Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:

Gabriel Mora i Arana (prezidanto), Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy
Brian Carr (Florluda Majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (Florluda
Majstro), Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip,
Giorgio Silfer (Florluda Majstro), Joan Ramon Guiñón i Roset (sekretario)

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence BICKNELL (3aj IFL, Olot 1913), Artur DOMÉ-
NECH i MAS (6aj IFL, Reus 1916), Marian SOLÀ i MONTSERRAT (6aj IFL, Reus
1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona 1921), Jaume GRAU i CASAS
(9aj IFL, Manresa 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980),
Giorgio SILFER (24aj IFL, Olot 1984), Timothy BRIAN CARR (28aj IFL, Barcelona
1988)

PEDAGOGIA KOMISIONO: Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Josep
Tordera, Manel Marqués.

VORTARA KOMISIONO: Jordi Carbonell i Pinyol-Avda. del Paral.lel, 96-6è-Tel.
329.2481 - 241.9411, 08015 Barcelona.

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: **Centre d'Esperanto Sabadell**, Apartat, 407, Papa Pius
XI, 130-tl.(93) 716.3633, 08200 Sabadell; **Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu
Balaguer/Esperanto Grupo**, St. Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf);
Centre Excursionista Puigcastellar/Esperanto - Grupo, St. Josep, 20- 08912 Sta.
Coloma de Gramenet (Barcelonès); **Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/
Departament d'Esperanto**, Mallorca, 207 - pral. tel. (93) 253.9507, 08036 Barcelona;
Esperanto - Centro Tarragona, Apartat 1236- 43080 Tarragona; **Esperanto-Fako
"S.C. Joventut Terrassenca"**, St. Francesc, 52 08221 Terrassa; **Esperanto Grupo
"Jozefo Anglès"**, Apartat, 336-08190 Sant Cugat del Vallès; **Firma Tero Esperanto
- Fako Centre Comarcal Lleidatà**, Gran Via, 592 08007 Barcelona; **Grup
Esperantista Sant Pau d'Ordal**, Dr. Zamenhof, 12 tel. 899.3003 - 08739 Sant Pau
d'Ordal; **Ĝirona Espero**, Apartat, 509 - 17080 Girona, **Hispana Esperanto - Fer-
vojlista Asocio ĉe Stacidomo Sants- Barcelona**; **Secció d'Esperanto Centre d'Es-
tudies Comarcals d'Igualada**, Baixada de Sant Nicolau, 21 08700 Igualada.
Dipòsit Legal: B- 27362 - 1982. Presita ĉe **Ràpid Graf**. 725.5091 Sabadell.

KOMARKAJ DELEGITOJ

Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i Roig
St. Magí 20 - 3r. tel. (93) 893. 7176 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf)

Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda. Escola Llar. Ctra. de la Canya,
s/n. tel. (972) 263829 - 17800 OLOT (Garrotxa)

Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva: Ĝirona Espero, Apartat,
509 - 17080 Girona (Gironès)

Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep Ma. Serrano, Edifici Europa
B-2-1 (St. Pere i St. Pau) tel. (977) 218941 - 43007 Tarragona (Tarragonès)

Baix Ebre, Montsià: Josep Ma. Altadill - Berenguer IV, 23 tel.
(973) 442009 - 43500 Tortosa (Baix Ebre)

Illes Balears: Xavier Margais i Basi, Orient, 60 - tel. (971) 613830
07110 Bunyola (Mallorca)

Catalunya Nord: Joan Fernández, 21 rue Henri Matisse - F 66000
Perpinyà (Rosselló)

KOTIZOJ 1990

Dum 1989 ni preskaŭ sukcesis reguligi la kotizpagon de nia membraro, sed tamen tiu preskaŭ ankoraŭ ĝenas nin. La plej granda parto de nia membraro volonte kunlaboras per sia rajtigo enspezi la kotizon trabanke, por ni la plej bona kaj tempoŝpariga solvo, sed kelkaj membroj ankoraŭ hezitas pri la sistemo.

Kiam temas pri membroj loĝantaj en Barcelono mem, ili povas pagi ĉe Unesko, kie ni rajtas deponi la kvitancojn. Se temas pri membroj loĝantaj ekster la ĉefurbo, kie ajn en Katalunio, ili povas pagi per bankmandato kreditebla en nian konton 550-53 ĉe "Caixa de Pensions-Agència 461-Sabadell" aŭ per poŝtĝiro nome de nia Asocio kaj rekte al nia poŝta adreso "Apartat, 290-08200 Sabadell".

Ni antaŭvidis enspezi la kotizojn por 1990 dum la unua trimestro de la jaro. Ni petas al niaj karaj membroj kiuj ne pagas trabanke ke ili pagu dum la antaŭvidita limo laŭ de ili elektita sistemo.

La kotizo por 1990 restos senŝanĝa je 1.600 p-toj en la kategorio Individua Abonanta Membro.

Ni antaŭdankas vian tujan kunlaboron.

TOMBEJO DE SINERA

La eldonita poemaro, prezentita dum la 24a Kataluna Kongreso de Esperanto en Perpinyà pasintan septembron, enhavas kaj la poemon en la kataluna originalo kaj esperanta traduko kaj kvarpaĝan antaŭparolon de la tradukinto. La libreton oni povas aĉeti ĉe nia Asocio po 200 p-toj. Rabaton ricevos la mendoj de almenaŭ 5 ekzempleroj.



LA DANĜERA LIBRO

Jen la titolo de la prozaĵo, kiun ni sekve reproduktas, per kiu Pedro M. Martin Burutxaga gajnis la premion "Galanto" en la 2a Katalunia Beletra Konkurso "Nova Futuro"

Antaŭ kelkaj monatoj mi renkontis en nia grupejo malnovan amikon, kiu dum la lastaj du-tri jaroj loĝis en eksterlando. Ni reciproke salutis tutkore kaj afable interparolis dum preskaŭ unu horo kaj duono. Li scivole demandis pri miaj aferoj, sciigis min pri la siaj kaj iom-post-iome la konversacio saltis, kompreneble, al esperantaj temoj.

Mia amiko estas elstara membro de nia asocio, plurfoje ties sekretario, granda organizanto kaj fervora movadano. Dum ni parolis pri novaj verkoj, Marko, tiu estas lia nomo, demandis:

"Ĉu vi legis tiun libron de germana historiisto Lins pri la persekutoj kontraŭ la Esperanto-movado?"

"La riska...?, mi dubis.

"Danĝera", li korektis, "La danĝera lingvo. Terurega. Ĉu ne?"

"Ĉu ĝi ne plaĉis al vi?"

"Ho, jes! Temas pri tio, kion li rakontas. Ĝi multe pensigas min. Imagu! Politikaj persekutoj! Koncentrejoj! Mi neniam antaŭe konsciis, ke la ŝtatoj vidas en ni ekstermendaĵojn malamikojn!"

"Ne troigu, Marko. Mi ankoraŭ ne legis la libron, sed iu rakontis al mi, ke ĝi temas precipe pri naziaj kaj stalinismaj persekutoj. Bonvolu ne kompari nian demokratian ŝtaton kun tiuj diktatoraj fi-reĝimoj!"

"Mia simpla amiko, pensu, ke ĉiu reĝimo povas subite ŝanĝiĝi. Ĉu vi eble forgesis pri tiu puĉ-intenco de altranga militisto antaŭ kelkaj jaroj? Krome, kiu scias pri la veraj planoj de niaj, laŭdire, demokratiaj registaroj? Ĉu ili decide helpas, subtenas, nian movadon?"

"Fakte, ne multe", mi konsentis.

"Do, la ununura diferenco estas ilia dependo de la civitanaj voĉdonoj, nur pro tio ili ne kuraĝas agi malkaŝe. Sed mi estas certa, ke ili profunde malamas nin. Ni devas esti pretaj, kredis min. Ni povas lerni multajn historiajn lecionojn en tiu libro. Sed... kion ni faru?"

Post tio li gravmiene silentis dum kelkaj minutoj kaj la alveno de aliaj konatoj niaj definitive interrompis nian konversacion.

Antaŭ mia somera feriado mi denove renkontis Markon. Li aspektis feliĉa, mistera rideto aperis sur lia vizaĝo, kaj eĉ lia verda steleto ŝajnis brili sur lia jako. Kiam li vidis min, li proksimiĝis per longaj, decidaj paŝoj, prenis min je la brako kaj post varma saluto konfesis per mallaŭta voĉo: "Mi trovis la solvon!" Kiam mi demandis, pri kio temas, li rakontis al mi lorgan serion da sensencaĵoj. Li ŝajnis plene konvinkita, ke pli-malpli baldaŭ la registaro provos nenigi nian movadon; aŭ tute subite je duontrebla preteksto aŭ malrapide, asocio post asocio, membro post membro. Pro tio li ĵus fondis novan (ankoraŭ unu-membran) societeton kun la kurioza nomo de Kamuflita Asocio de Sirmittaj Esperantistoj (mallonge KASE). Li fiere detalis la objektivor de sia organizo: "ebligi rapidan kaj senspuran malaperon de la Esperanto-movado por savi ĝin el ia ajn persekuto, konservante samtempe la tutan materialon kaj membraron".

"Ni devos, kompreneble, rezigni varbadon, kursojn, kunvenojn, ktp, sed ni restos sekuraj, ŝirmittaj de la batoj de niaj malamikoj. Atendante, senaktivaj sed fortaj, pli bonan tagon por nia afero. Same kiel faras kelkaj bakterioj, kiuj..."

"Sed kara Marko, ĉu vi ŝatos vivi kiel bakterio?", mi ridetante interrompis.

"Ridu, ridu, povra skeptikulo! Tempo pravigos min" Kaj ŝajne iom ofendite li aldonis, ke li havas ankoraŭ multon por fari, adiaŭis min kaj foriris.

Kiam mi revenis hejmen post tre agrabla vojaĝo al la sudo, mi trovis tri leterojn el Marko atendante min sur mia skribotablo. Mi ordis laŭ datoj kaj malfermis ilin.

En la unua li skribis, ke malgraŭ mia skeptikeco li konsideras min vera amiko kaj sekve atente zorgos, ke mi ricevu informojn pri la agado de KASE, por ke ankaŭ mi estu preta okaze de "katastrofo" (la stilo de la leteroj estis vere apokalipsa). Sekvis konfuza teksto pri baldaŭa atenco kontraŭ Esperanto fare de la sekreta polico, kaj aliaj stultaĵoj.

La dua koverto entenis jenan fotokopiitan cirkuleron:

KASE Informilo: Individuaj Sindefendaj Instrukcioj

Okaze de Flava Alarmo

- Demetu steletojn, algluaĵojn kaj similajn objektojn de viaj vestoj, aŭtoj kaj personaj aĵoj.
- Ne parolu pri Esperanto kun nekonatoj.
- Ne organizu novajn kursojn
- Ne renovigu vian abonon al esperantaj publikaĵoj

Okaze de Ruĝa Alarmo

- Bruligu vian membrkarton
- Kaŝu viajn esperantajn librojn kaj objektojn (bone pakitaj en sekan lokon)
- Ne reiru al via grupejo
- Ĉesigu tutan publikan aktivadon (kursojn, prelegojn, renkontiĝojn, ktp)
- Ne parolu pri Esperanto en publikaj lokoj
- Komuniku novan (tute falsan) adreson al viaj korespondantoj kaŭze de (neekzistanta) translukiĝo al fora urbo

Kaj ĉiam memoru: Bona esperantisto estas viva esperantisto!

Ankoraŭ ridetante, mi malfermis la lastan leteron. En ĝi li sugestis kelkajn rimedojn por daŭrigi la kontaktojn inter la "ŝirmittaj esperantistoj": renkontiĝoj en parkoj, transdonado de ĉifritaj cirkuleroj en kafejoj, organizado de sendependaj ĉeloj... Li finis per demando, ĉu mi scias pri sekura komunikilo inter urboj, ĉar telefono kaj korespondado estos certe kontrolataj kaj oftaj vojaĝoj prisuspektataj.

Lastan semajnon mi renkontis nian prezidanton en la grupejo. Li ŝajnis tre ekscitita kaj sen ia ajn saluto abrupte demandis min, skuante folion antaŭ mia nazo: "Kion signifas ĉi tiu paperaĉo?" Temis pri alia "KASE Informilo", tiuokaze "Kolektivaj Sindefendaj Instrukcioj" por Esperanto-asocioj, kiel ekzemple bruligi arkivojn, forvendi meblaron, nuligi bankkontojn, kaŝi la monon... kaj aliaj. La viro furiozis.

"Vi estas lia plej bona amiko, parolu kun tiu frenezulo! Li eĉ komencis sendi strangajn leterojn al la komitatanoj! Tio devas tuj ĉesi, kaj tempon mi ne havas. Hodiaŭ mem mi devas paroli kun la urbestro, tiuj stultaj burokratoj petas liston de nia membraro antaŭ ol doni subvenciojn; laŭ ili nia asocio ne povas esti tiel granda kiel ni diras. Avaruloj! Bonvolu paroli kun Marko, mi fidus vin. Ĉu vi faros? Dankon!"

Mi telefonis mian amikon, sed neniu respondis. Tagmeze, enirinte hejmen, mi trovis sur la planko senadresan koverton, kaj en ĝi nur kvadrateton el flava papero kun du nigraj literoj: F.A.

Mi denove telefonis Markon. Ĉi-foje li estis hejme. Ankaŭ li volis tuj paroli kun mi. Lia voĉo sonis ekscitita. Post horduono li sonorigis ĉe mia pordo. Kia ŝanĝo! Li aspektis laca, timigita, lia rideto tute malaperis kune kun lia verda steleto.

"Oni sekvas min", li flustris. Mi rigardis malsupren en la ŝtuparo, sed nenion vidis. Ni eniris kaj li komencis rapide paroli. Mi nur malmulte komprenis: teruraj signoj, Flava Alarmo, distribuado de avertoj, sekvita la tutan matenon...

Mi klopodis trankviligi lin, sed apenaŭ sukcesis. Post longa ekscitita parolado, vidante, ke ne eblas konvinki min, li decidis foriri. Sed antaŭ tio li fiere anoncis trovitan solvon por sekura komunikado inter ĉeloj en foraj urboj:

"Kurierkolomboj! Se kaptitaj oni tute ne povas paroligi ilin", li ridis, "Krome, ili estas nur tre malfacile sekvataj. KASE organizos tutan kolombo-reton. Fidu min!"

Kaj li lasis min ĉe la pordo, konfuzita kaj senvorta.

Ci-matene mi iris viziti Markon. Grupeto de homoj staris antaŭ lia domo. Ankaŭ ambulanco kaj granda aŭtomobilon mi vidis. Mi rapide parkis kaj alproksimiĝis. Du grandaj viroj kun uniformoj havantaj nigrajn krucojn de iu privata san-servo perforte portis lin al la ambulanco. Li vidis min kaj vane klopodis liberigi sin. Tiam li kriis en Esperanto, skuante la kapon kiel frenezulo, ne rigardante min: "Fuĝu! Ne diru, ke vi konas min! For! Kaj kiam finfine la viroj metis lin en la ambulanco ankoraŭ lastan kriegon aŭdiĝis en la aero per funebra voĉo: "Ĝi komencis!"

Apud mi tre eleganta viro kun nigraj okulvitroj kaj valizeto komentis: "Kompatinda homo. Li kredas esti viktimo de konspiro. Mi ne scias, ĉu li tute resaniĝos", kaj demandis min, ĉu mi estas konato lia. Iom hezite, mi neis. Tiam alia viro eliris el la domo kun granda kartona skatolo kaj metis ĝin en la aŭtomobilan kofron. Antaŭ ol li ĝin fermis, mi povis rekoni en la nefermita skatolo plena de paperoj kaj libroj ekzempleron de P.I.V. Mi tuj forlasis la lokon. Iris al mia aŭto kaj rapide malfermis la pordon. Tiumomente mi rimarkis la belan ŝlosilujon el ledo kun verda stelo kaj la vorto ESPERANTO sur ĝi, donaco de tre estimata amikino, en kiu mi portis la aŭtomobilajn ŝlosilojn. Mi prenis ilin el la ujo, suspekteme ĉirkaŭrigardis, kaj ĵetis ĝin en apudan rubujon.



Komence de la okdekaj jaroj junulinaj-inter aliaj-voĉoj rifuzis kiel masklismankutimon la daŭrigon de la konservado de tiu arkaika kreitaĵo: la Reĝino de la Floraj Ludoj.

Laŭ mia modesta vidpunkto pli gravas la konservado de niaj tradiciaj kulturaj valoroj (ĉi-kaze okcitanaj kaj katalunaj) ol la forigo de iu nebula subpremado far la maskloj.

Lastatempe la Konservantaro de la IFL elturniĝis, iom aktivigante la Reĝinon por ke ŝi ne estu en pasiva embaraso. Sed alvenis 1989 kaj la ĵurio aljuĝis la Naturan Floron al poldevena angla poeto Krys Ungar, kiu anstataŭ elekti sin mem kiel Reĝinon-same kiel en 1909 faris la germana Marie Hankel-, ŝi preferis elekti viron kaj proponis tion al la ĉeestantaj ĵurianoj en la Kataluna Kongreso en Perpinyà.

Por mi estisdilemo: akcepti tiun tranĉon kun la arta tradicio aŭ decidi la forsvenigon de la Reĝino de la Festo. Kion fari?

Kiu pezilo decidis miaflanke la elekton de Reĝo? Anekdote mi deklaras esti amanto de angla muziko. Mi konis la temon de opero de Benjamin Britten, en kiu Lady Billows, netolerema vilaĝa aŭtokratino fine de la viktoria periodo, rifuzas ĉiujn kandidatinojn al la titolo de "Maja Reĝino", ĉar ili malĉastas. La superintendanto de la vilaĝo subite proponas: Kial ne "Maja Reĝo"? Kaj oni elektas Albert Herring (tiu estas la opera titolo) modelan kaj laboreman junulon, kiu tamen poste... sed ne decus ke mi daŭrigu la rakontadon de la komikaj aventuroj de la protagonisto. Do, mi levis la ŝultrojn kaj balotis por la Reĝo, kiel la aliaj ĵurianoj. Mi esperas ke post multaj jaroj, se similaj okazoj ripetiĝas, ankaŭ la "Reĝo de la IFL" fariĝos esperante tradicia. La ĵus nomumita Reĝo, post kelkaj minutoj, festparoladis.

Jordi Carbonell i Pinyol

KCE

La feriejo GASTEJO EDMOND PRIVAT de Kultura Centro Esperantista (Chemin des Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) estas dum la tuta jaro ideala hejmo por studemaj kaj promenemaj esperantistoj. Petu la informilon!

Daŭrigo de la kurs-programo de INSTITUTO INTERNACIA EDMOND PRIVAT (vidu antaŭan informon sur nia revuo n-ro 262-junio 1989-8a paĝo)

13-18 februaro 1990: Esperanto-staĝo

19-24 februaro 1990: Esperanto-staĝo

24-25 februaro 1990: Lingvo-studa semajno fino por komencantoj kaj progresantoj.

24-26 februaro 1990: Bahaa Renkontiĝo

19-24 marto: Esperanto-staĝo.

9-14 aprilo: Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj. Instruos: C. Gacond, F. Degoul kaj S. MacGill.

12-13 aprilo: Esperanto-ekzamenoj laŭ la normo de UEA-ILEI.

 **kooperativo de literatura foiro**

LITERATURA FOIRO 20-jara

La kultura revuo en esperanto fondita de la literatura rondo "La Patrolo" inaŭguris, per la numero 117 (februaro 1989), sian dudekan jarkolekton.

LITERATURA FOIRO, kies unuopaj numeroj ampleksis nur 16 paĝojn, atingis ĉi-jare 56, konservante la dumonatan aperoftecon, laŭ konstanta kresko tra la jardekoj. Ĝia enhavo, ĉefe beletra, dediĉas grandan atenton al ĉiuj facetoj de la esperanto-kulturo: teatro, muziko, pedagogio, planlingvistiko, kulturpolitiko, movadologio.

La ĉefredaktoro de LITERATURA FOIRO estis Giorgio Silfer, ĝis la numero 60 (aprilo 1980): de post tiam gvidas la redaktan stabon Sino Perla Ari Martinelli, kiu per sia talento de arta direktoro firmigis la grafikan nivelon de la revuo, sendube unu el la plej belaspektaj en nia gazetaro.

LITERATURA FOIRO naskiĝis kiel periodaĵo en esperanto, ne kiel esperantista organo: al tiu ĉi devizo ĝi estis ĉiam fidela, starigante kun sukceso ponton inter la mikrosocia E-kulturo kaj la makrosocio. LF rolis ĉiam sendepende kaj aŭtonome, stimulante la evoluon de la kolektiva konscio en Esperantio, kaj la kvalitan kreskon de nia parolkomunumo.

LITERATURA FOIRO estas eldonata de la kooperativo de Literatura Foiro (Svislando); ĝiaj redaktantoj kaj kunlaborantoj laboras senpage. La adreso de la redakcio estas en Italio: via Pantano, 17 - 20122 Milano.

Ne persone, sed spirite. La 17an de septembro, sub la iniciato de la lokaj esperantaj grupoj la trupo "L'Espantall" de Manresa enscenigis la premieron de 'Zamenhof "Doctor Esperanto"' en la teatro "Conservatori", lukse plurjarcenta, pluretaĝa salonego en la centro de la ĉefurbo de "El Bages".

Onidire samideano de Manresa havis la ideon, planis ĝin kaj makiavele ŝovis ekzempleron de la kataluna traduko de "Zamenhof, aŭtoro de Esperanto" de nia angla poetino Marjorie Boulton al Martí Camprubí i Puigneró-loka teatra verkisto simpatianta al Esperanto-kun la demando: Ĉu vi kapablas...? kaj li fulme pretigis teatraĵon.

Camprubí metie plukis kaj vicigis la plej feliĉajn anekdotojn, kiuj vigligis la kernon de la zamenhofa biografio. La teatraĵo fluas glate ĝis la fino, kio estas granda laŭdo, sed por neesperantista spektantaro ne sufiĉe konanta la vivon de la unua esperantisto estas verko iom raspa, ĉar la granda nombro de roluloj (18) komplikas la tujan komprenemon kaj povas malaltigi la ĝeneralan atenton.

Kelkfoje la aŭtoro lasas flugi sian fantazion kaj elpensas fratajn reciproke admirajn rilatojn inter Zamenhof kaj J. Martin Schleyer. Miaj scioj pri la aŭtoro de Volapük ne kongruas kun tia sinteno. Ĉu s-ro Camprubí ĉerpis tiun ligon el falsa fonto? Ĉu la celo-la atingo de teatra efekto- pravigas la rimedojn -manko al la vero-?

La plej grava atuto de la verko estas sendube la kreo de la rolo de la rakontantino M. Boulton. Ĝi estas speco de ĵurnalistino, kiu de tempo al tempo enmiksiĝas kaj klarigas aŭ priopinias en la hodiaŭo al spektatoroj. Ĝi kunigas la zamenhofan tempon kun la nuntempo kaj krome helpas kaj la komprenemon kaj la analizon flanke de la aŭdantaro.

La reĝisoro parte fiaskis. Nur povas senkulpigi lin la rapideco, la trupo ne havis sufiĉan tempon por prepari "profesie" sian laboron. Oni pardonas kelkajn lingvajn stumblojn tipe premierajn, sed... ekzemple: dum la parolado de Zamenhof en la U.K. en Barcelona unu el la publiko ekkrias: -Parolu en Esperanto! Ĉu Zamenhof povus paroli en la kataluna, en la kastilia, en sia pola aŭ en alia nacia lingvo? Ĉu en Oficiala Malferma Parolado en U.K.?

Alia ekzemplo: ĉu en 1909 la himnon "Els Segadors" oni povus disaŭdigi por krei katalunan depostulan etoson? Alia mispaŝo estis la prozodiaj kaj sintaksaj eraroj, barbarismoj... senhalte aperantaj. Ĉu nur la aktoroj kulpas? Necesus por plua prezentado -kio bezonatas kaj oni instigos kaj aplaŭdos- pli rigora kontrolo. Kion opinius la kleraj neesperantistoj antaŭ tiuj eraroj, kiuj sufiĉus por signi iun malklera aŭ ion malkleraĵo?

La korekto de la misprononcoj de la malmultaj esperantaj vortoj estas io facila: kiu ajn kapabla esperantisto de Manresa povus solvi la aferon (mi memoras la plej disaŭdigitan ekkrion: paco! paco!... kaj ni aŭdis: paco! paco!).

La verko permesas al enscenigisto bonege dismeti tipe modernajn artifikojn -eble nun jam eksmodajn aŭ iom gurditajn-: roluloj en loĝioj, krioj el la publiko... Laŭdindas la logikeco de la aktoraj movoj kaj de la intermita enmiksiĝo de la rakontantino; ankaŭ la ĝenerala entuziasma klopodo por vivigi la rolojn, precipe la de la du protagonistoj: M. J. Isart, vigla gazetistino kaj Josep Soler, kiu laŭ mia vidpunkto aktoritis profesie sed skizis iun Zamenhof iom plørema kaj trista. Post la tondro de aplaŭdoj -la tuta trupo sursceneje-, oni petis la aperon de la aŭtoro Martí Camprubí, kiu esprimis sin per kora paroladeto kaj poste li mem invitis la ĉeestantan tradukiston de la zamenhofa biografio de Boulton, kiu salutis kaj dankis ĉiujn nome de K.E.A.

Karbero Kernó

P.S. Oni devas plendi, ke la evento ne estis sufiĉe disanoncita. Ni ne vidis afiŝojn en la urbo por altiri la atenton de la neesperantistoj, de la teatroamantoj. Eĉ mankis ĝenerala alvoko al la esperantistoj, multaj el ni nur konis la ekziston de tiu laŭdinda entrepreno per la digna programo, kiun oni disdonis en la Kataluna Kongreso en Perpinyà, nur 6-7 tagoj pli frue. Malgraŭ ĉio ni ĉeestis vesper sukceson por Esperanto en Manresa.

Bernard Golden

La enhavo de pluraj periodaĵoj en Esperantujo inkludas, krom novaĵoj kaj beletraĵoj, ankaŭ distrajn pecojn en la formo de ŝercoj, bildstrioj kaj krucvortenigoj. Lastatempe nova speco de lingvoludo aperis: en La Gazeto ĝi nomiĝas "La dekerara teksto" kaj en Esperanto-95 ĝi portas la titolon "La 12-erara ludo". Temas pri didaktika distraĵo, kies celo estas testi la lingvokapablon de legantoj. La redakcio enŝovas dek aŭ dek du erarojn en tekston verkitan aŭ tradukitan de konata esperantisto. La celo estas trovi tiujn diversspecajn erarojn-ortografiajn, gramatikajn, kaj semantikajn. Aliloke en la sama numero de la gazeto aŭ revuo troviĝas la senarigita teksto por kontrolo.

Kiel kunlaboraĵon en Kataluna Esperantisto mi proponas variaĵon de la dekerara teksto. Anstataŭ difektigi tekston verkitan en bona Esperanto, mi kunmetis dekon da citaĵoj el publikigitaj verkoj, kiuj jam enhavas erarojn! Plue, en la kontrolparto mi ne nur indikas, kie troviĝas la misaĵoj sed mi ankaŭ klarigas, kial ili estas eraraj kaj montras kiel estas eble ĝustigi ilin. Por fari pli interesaj la citaĵojn, mi ĉerpis ĉiujn el verkoj de estintaj aŭ nunaj membroj de la Akademio de Esperanto. Pro tio mi nomas tiun ĉi distraĵon la dekerara Akademia ludo. Eĉ se vi ne sukcesos trovi ĉiujn erarojn, vi ĉiuokaze lernos ludante.

1. Inter la du grandaj mondpotencoj ekestis konkurenco nur por teni la du landojn en stato de egaleco, malgraŭ tio, ke la rakedoj posedataj eĉ de unu tia potenco povus detruiri dekon, eĉ centon, da mondoj.
2. Tiaj kontrolitaj libroj ricevas sur la fruntpaĝo la indikon "KONTROLITA DE EVA"
3. Jes, ni identiĝas kun la progresivaj tendencoj de la Iltisanoj ...
4. La etimologiaj esploroj en Esperanto ne estas nuraj kabinetaj spekulaciaj ludoj.
5. Kaj nun mi sondas mian memoron por skafandri kelkan nombron de tiaj verboj.

6. Rezulto de tiu plurjara laboro estas dika eleganta volumo, kies indekso nombras 72 aŭtorojn, tradukitaj de 29 homoj
7. Se la duko daŭrigos sian favoran sintenon al vi, Cezario, vi certe tre rapide avanciĝos.
8. La problemo de troa kresko de la vortaro ne jam sentiĝas tiel akre, ĉar pro la neĝenerala disvastiĝinteco de Esperanto ne jam ĉiuj kulturoj alportis siajn specialaĵojn al ĝi.
9. En Esperanto necesas trovi alian finaĵon ol -io, tiel ke ne okazu koliziojn, "konfliktojn" inter la lingvaĵo de kemiistoj kaj la ĉiutaga lingvaĵo.
10. La viro, kiun mi trovis mortintan sur la rafunja ebenaĵo apud la korpo de Laura Pergame, havis tute normalan manon.

junio 1989

EUROKKA INFORMAS

Ke ĝi produktas Esperanto-Rok-disketon aperontan komence de 1990, kiu enhavos titolojn de du Esperanto-rokbandoj, nome:

"Amplifiki" jam fama, la sola rokbando internacia kaj plurseksa kaj "La Rozmariaj Beboj" tute nova Esperanto-rokbando el Tuluzo. Amuza kaj simpatia kun Jomo la kantisto de la bando, kiu kantante sola nomiĝas "La fuĝinto el Alkatraz".

Antaŭmendu jam de nun rekte al KEA.

ESPERANTO-VIDEO MUZIKA CENTRO ĉe FEJA (Fondaĵo de Esperantistaj Junularaj Arandaĵoj) en Moskvo, informas pri la baldaŭa apero de granda disko kaj de muzika video-filmo. Pli detalan informon ni aperigos sur venonta revuo.

AIS, Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino okazigis sian 8an Ĝeneralan Asembleon la 3.9.89, gvide de ties prezidanto DProf. Dr. H. Frank.

Aprobiĝas la bilanco por 1988 la buĝeto por 1989 kaj la senŝarĝigo de trezoristo kaj de la Senato.

Oni proponas ke AIS starigu terminologian komisionon kun po unu reprezentanto el ĉiuj sciencaj sekcioj kaj la arta kaj la teknika sektoroj. La komisiono estu kontakt-forumo kun TEC de UEA. Oni akceptas ke ADoc. Pachter reprezentu AIS ĉe TEC.

Pri la planataj aranĝoj en Tallin kaj Moskvo oni diskutas la fakton ke ne ekzistas rusa akademio de la sciencoj, kiu povus esti ruslanda partnero, sed sovetia akademio kiu reprezentas tutan Sovetion, kvankam ĝi aplikas nur la rusan lingvon kaj la aliaj sovetaj respublikoj havas proprajn akademiojn. La prezidanto certigas ke AIS agos laŭ siaj principoj, kiuj kontraŭas lingvan

imperiismon. La asembleo unuanime aprobas tion.

(En venonta revuo ni raportos pri la 12a kunsido de la Senato de AIS)

TAKIS, Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko, jarkunvenis la 21.8.89 en Namur (Francio) kun la partopreno de niaj KEA-membroj Lluís de Yzaguirre kaj Neus Moly.

Aprobiĝis okazigi venontan kongreson Interkibernetik'90 en Poprad (CS) la 12-14.9.90, kies programon ni publikigos en venonta revuo.

Oni priraktis la eblecon ĉu TAKIS kunfandiĝu kun la kibernetika sekcio de la Internacia Scienca Kolegio (ISK) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kion oni plutraktos dum Interkibernetik'90.

Kiel rezulto de kunlaboro kun World Organisation of Systems and Cybernetics (Wosc) en ties 9a kongreso, verŝajne IL (Internacia Lingvo Esperanto) fariĝos simbola dua laborlingvo.

1. En la kunteksto de la frazo, la vorto "rakedo" estas erara. Ĝi estas ligna pilko de spacpafado aŭ mistilo.
2. "Funto" estas la superokula parto de la vizago inter la tempioj; ĝi ne povas esti parto de libro. En la kunteksto temas pri la "frontpaĝo" de kontrolita libro.
3. La verkinto volas diri "progresemaj tendencoj". La signifo de "progresiva" estas "iom post iom regule pligrandiganta", kiel "progresiva imposto" aŭ "progresiva bremsado".
4. Spekulado okazas ne en kabinetoj sed en borsoj, kie oni investas monon kun la espero ricevi profiton. Intelekta agado en kabineto estas spekulativa, t.e. bazita sur teoria rezonado.
5. "Skafandri" estas sensenca en la citaĵo. Ĝi povas signifi nur "meti sur la korpon skafandon", kiu estas hermetika vesto por iri kaj labori subakve. La aŭtoro de la frazo verŝajne volas diri, ke li sondas sian memoron por "malmergi" aŭ ĉerpi verbojn.
6. La particip-adjektivo "tradukitaj" rilatas al la substantivo "aŭtorojn"; sekve devas esti kaza akordo "tradukitajn".
7. "Avanci" estas netransitiva verbo, signifanta "promociigi", "rangaltigi". La tradukinto devis skribi: "vi certe tre rapide avancos". La netransitiva sufikso "-ig" estas superflua.
8. Dufoje en la frazo troviĝas la esprimo "ne jam", kiu laŭ la konsilo de Zamenhof, estas evitenda kaj anstataŭigenda per "ankoraŭ ne".
9. Pro la inversa vortordo en la frazo, la verkinto konfuziĝis kaj erare metis en la akuzativan kazon "kolizioj" kaj "konfliktoj", kiuj estas la subjektoj de la verbo "okazu".
10. La frazo devas teksti: La vitro, kiu mi trovis mortinta... Ĝi ilustras specialan uzon de la predikativo por montri la staton de la objekto de la frazo en la momento de la predikata ago. La subjekto "-mi" - ne trovis mortintan vitron sed trovis, ke vitro estas mortinta. Pro tio la particip-adjektivo "mortinta" ne estas objekta epiteteto (ĝe akuzativo) sed objekta predikativo (ĝe nominativo).

NIA AGADO

6a INTERGRUPA RENKONTIĜO

Okazinta la 8an de oktobro en la Muzeo de St. Pau d'Ordal, ĝi arigis pli ol 20 partoprenantojn el diversaj KEA-Grupoj (Barcelona, Igualada, Sabadell kaj Tarragona). Okazis atenta vizito de la muzea materialo, debato pri la estonta sinteno de nia asocio rilate la novan HEF-estraron kaj la ĝentila direktoro de la Muzeo kaj ties edzino regalis la ĉeestantojn per lunĉo tre dankinda. Finiĝis la renkontiĝo per komuna tagmanĝo ĉe proksima restoracio. (sekvas foto kun parto de la partoprenantoj antaŭ la enirejo de la Muzeo).



BARCELONA

Kiel kutime okazis memoriga Zamenhof-Festo en niaj aliĝintaj Grupoj, la 9an ĉe Firma Tero kun prezento de filmo, deklamado fare de Maria Almagro kaj Ricard S. Güell, recitalo de Mariona kaj koncerto de nia junulara ensemblo "Korĉoj", la 16an ĉe Unesko kun prelego de Gabriel Mora i Arana kaj koncerto de "Korĉoj".

SABADELL

La 17an de decembro okazis la solena inaŭguro de la monumento al d-ro Zamenhof kun ĉeesto de la loka urbestro kaj de d-ro Ulrich Lins nome de UEA. Detalan raporton kun fotoj ni aperigos en nia venonta revuo.

TARRAGONA

Ricevinte la trian informilon de la tiea loka Grupo, ni ĝojas ĉar la movado daŭre progresas kaj enradikiĝas tie.

TORTOSA

Ni dankas la iniciaton de nia tiea delegito Josep M. Altadill, aperigi grandformatan anoncon en la loka ĵurnalo "Ebre Informes" pri la perkoresponda kurso de nia asocio.

RESUMA RAPORTO PRI LA AGADO DUM LA KURSO 1988-1989 DE ESPERANTO-GRUPO ĈE UNESKO

En nia sidejo ni okazigis diversajn kursojn, krom la kutimaj kunvenoj de la 1a kaj 3a sabatoj ĉiumonate.

Lunde, elementa kurso por plenaĝuloj gvidata de Neus Moly kaj Ramon Perera. Marde, Jozefo Tordera gvidis progresigan kurson.

Marde kaj ĵaŭde, Gemma Armadans gvidis elementan kaj progresigan kursojn por gejunuloj.

La ĉeestantoj en la klasoj estis meznombre 5-10 gelernantoj.

La sabataj kunvenoj estas simplaj konversaciaj rondoj, kie krom konversacio, oni legas kaj komentarias gravajn artikolojn aperintajn en esperantaj revuoj. Ankaŭ oni disaŭdigas diskojn kaj sonbendojn.

Je la sabato 17a de decembro, ni okazigis eksterordinaran kunvenon honore al la kreinto de Esperanto d-ro L.L. Zamenhof. Ni projekciis la gravan videofilmon "Mefisto" kaj je la fino ni regalis la pli ol 100 ĉeestantojn per trinĉaĵoj kaj manĝetoj.

NEKROLOGO

Ni kondolencas tre sincere s-non Miguel Gutiérrez Aduriz el Santander, konservanto de niaj Internaciaj Floraj Ludoj, pro la forpaso de lia patro.